I. F. E. A.

ASSOCIAZIONE ITALIANA FERROVIERI ESPERANTISTI
Aderente alla INTERNACIA FEDERACIO ESPERANTISTA FERVOJISTA (I. F. E. F.);
alla UNIVERSALA ESPERANTO ASOCIO (U. E. A.) e alla FEDERAZIONE ESPERANTISTA ITALIANA (F. E. I.)
Sede Centrale: Dopolavoro Ferroviario - Piazza Calderini 4 - Bologna (Italujo)

ESPERANTO

# Informal Bulteno

ITALA FERVOJISTA ESPERANTO - ASOCIO

REDAKTEJO: Bologna - Via Donato Creti N. 61 - Tel. 59-071 REDAKTORO: Gimelli p. i. Germano

N° 8 - 9. Aŭgusto-Septembro 1957. 7-a Jaro

## ITALA FERVOJISTA ESPERANTO-Asocio
## VII-a NACIA KONGRESO - VARESE 22 SEPTEMBRO 1957

Dimanĉon, la 22-an de septembro 1957, je la 17-a horo, en Varese, la ĝarden-urbo de Lombardio en la seplaga provinco, okazos la 7-a Nacia Kongreso de la Italaj Esperantaj Fervojistoj por pridiskuti la sekvantan:

T A G O R D O N

1 - Raporto de la Prezidanto
2 - Raporto de la Kasisto
3 - Nomigo nova konsilantaro de I.F.E.A.
4 - Eventualaĵoj, diversaĵoj kaj libervolaj proponoj.

Niaj kolegoj vidas kiel interesa kaj decidiga estas nia proksima kongreso pro la gravaj argumentoj pridiskutotaj, kiuj multe influos la estontan disvolvon ne nur de nia Asocio, sed ĝenerale de nia tuta Esperanta fervojista movado. Pro tio ni turnas nin al ĉiuj niaj membroj kun varmega invito multnombre partopreni nian Nacian Kongreson je la 22-a de septembro en VARESE, ĉe kaj en la kadro de la 28-a ITALA NACIA KONGRESO DE ESPERANTO okazonta de la 21-a ĝis la 25-a de septembro 1957 en Varese.

Do, ĝis revido en Varese.

LA SEKRETARIO DE I.F.E.A.

UNIVERSALA ESPERANTO ASOCIO = ITALA ESPERANTO FEDERACIO
VARES-PROVINCAJ ESPERANTISTAJ KLUBOJ ORGANIZAĴO

## 28-a ITALA NACIA KONGRESO DE ESPERANTO
VARESE (Italujo): 21-a = 25-a Septembro 1957

P R O G R A M O (ne definitiva)

Sabato, 21-a Septembro : Akcepto de la kongresanoj
20,30 h. - Interkona vespero
Dimanĉo, 22-a Septembro: 8,30 h. - Sankta Meso
9,15 h. - Ĝenerala fotografado
10,00 h. - SOLENA INAŬGURO
11,45 h. - Inaŭguro de la Ekspozicio de Esperanto
15,00 h. - Asembleo de ITALA ESPERANTO FEDERACIO
17,00 h. - 7-a KONGRESO DE ITALA FERVOJISTA ESPERANTO-ASOCIO
21,00 h. - Balfesto
Lundo, 23-a Septembro : 8,30 kaj 14,30 h.- Ekzamenoj de Esperanto (3-gradaj)
11,00 h. - Jara Nacia Asembleo de I.L.E.I. (Instruistoj)
14,30 h. - Vizitoj en kaj ekster la Urbo
17,00 h. - Kunsido Ĝenerala Konsilantaro de la Itala Instituto E.
21,00 h. - Arta Vespero

Mardo, 24-a Septembro : 8,30 h.- Ekzamenoj de Esperanto (3-gradaj)
9,00 h.- Laboroj de la Kongreso
11,oo h.- Jara Nacia Kunveno de I.K.U.E. (Katolikoj)
14,00 h.- Ekskurso al Sankta Monto - Campo dei Fiori

Merkredon, 25-a Septembro: Tuttaga Ekskurso: Per turisma aùtobuso: Varese - Porto Ceresio (Lago di Lugano) - Luino (Lago Maggiore).
Per ŝipo: Luino - Locarno (Svisujo) - Cannero - Intra - Pallanza - Isola Bella - Stresa - S. Caterina - Laveno.
Per turisma aùtobuso: Laveno - Varese.
19,00 h. - Fermo de la Kongreso en Varese.

Grava Ekspozicio de Esperanto (eniro senpaga) okazos de la 22-a ĝis la 29-a de septembro, parte koincide kun la kongres-periodo. Ĉiu Grupo, ĉiu unuopa Esperantisto sendu liston de la materialo pruntedonebla por ĝi.

Kotizoj: Esperantisto FEI-ano 1957 £.1.200; Junulo (ĝis 21-j.) aù familiano £.600; ne Esperantisto £.1.500. Fremdaj Esperantistoj kaj blinduloj kun akompananto ne pagas kotizon. Marda Ekskurso £.200; Tuttaga Ekskur.£.1.000.

Loĝigado kaj Manĝoj: En Hoteloj en la Urbo kaj ĉirkaùaĵoj: tranokto £.500-900; matenmanĝo £.200-300; ½ pensiono £.1.300-2.200; pensiono £.1800-3000 Por gejunuloj, en Internulejoj: tranokto £.200-250; matenmanĝo £.150-200; aliaj manĝoj £.300-350; pensiono £.1.000-1.200. Por Tendumantoj: belegaj herbejoj tuj apud la Urbo, kaj arbaroj sufiĉe proksimaj.
Manĝoj en Restoracioj ek de 300 liroj.

Laboroj de la Kongreso kaj Temoj: Elekto de la nova Konsilantaro de I.E.F. Reorganizo de la Italaj Grupoj. Nia Revuo de I.E.F. "L'Esperanto". Prigrandigita Enkonduko de Esperanto en la Lernejojn. Aliaj proponindaj.
Ĉiu interesiĝanto al niaj problemoj gravaj kaj urĝaj sendu skribitan resumon, aù pli ampleksan dokumentadon pri ĉiu temo.

Programo de la Arta Vespero: Muzikoj kaj kantoj (kun partopreno de la fama gitarludisto kaj kantisto S-ro RINO SALVIATI) ankaù en Esperanto. "Lascia o Raddoppia" (imitado) pri historio de Esperanto, kun partopreno de ĉiu Esperantisto kiu estu bone preparata sur tiu temo. Mallonga parolado inter pioniro de nia Movado kaj knab(in)o en Esperanto. Premiado de la konkursoj por ĵurnalistoj kaj kongresanoj, per premioj afable oferdonitaj de la lokaj firmaoj.

TUJ ALIĜU - LA VARES-PROVINCO ATENDAS VIN ! - La ĜARDEN-URBO DE LOMBARDIO EN LA SEPLAGA PROVINCO GASTIGOS VIN DUM AGRABLA SEZONO PER KONFORTA RESTADO

## ĜOJGA ANONCO

Gino kaj Bruna Corso feliĉe anoncas al vi la naskiĝon de ilia unua filino MARA MARIA okazinta en Verona (Italujo) la 3-an de Aùgusto 1957.

Ni kaptas la okazonpor sendi al nia Komitatano Gino Corso, la plej varmajn kaj korajn bondezirojn, por la feliĉa okazaĵo, transdoneblaj ankaù al la edzino kaj precipe al la malgranda MARA MARIA.

La Estraro de I.F.E.A. kaj la Redaktoro

## INVITO AL LA JUBILEA KONGRESO

Laù decido en Rijeka la 10-jara jubilea IFEF-kongreso okazos en Aarhus, Danlando en la periodo de la 10-a ĝis la 16-a de majo 1958.
La L.K.K. jam nun petas vin rezervi tiujn tagojn. Ni atentigas vin pri la fakto, ke jam kelkaj anoj aliĝis sin. Ni esperas ke vi multnombre partoprenos, kaj ni promesas fari nian plej bonan, por ke la 10-a Kongreso fariĝu sukcesa. Pliaj informoj aperos en la sekvonta numero de "Bulteno. Vi ĉiuj estas kore bonvenaj. La L.K.K.

# 42-a UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO

## MARSEILLE: 3-an Aŭgusto - 10-an Aŭgusto 1957

Kongresejo: Scienca Fakultato de Marseille.
Protektanto: S-ro R. COTY, Prezidanto de la Franca Respubliko.

Sabaton, 3-an de Aŭgusto
19,30 h. Kunsido de la Estraro de U.E.A. kaj L.K.K.
20,00 h. Interkona vespero. Ĝi okazis en la Operejo.

Dimanĉon, 4-an de Aŭgusto
9,30 h. Inaŭguro de la 42-a Universala Kongreso de Esperanto.
Ĝi okazis en la Operejo dum solena ceremonio.
Muziko: La urba orkestro ludis "Uverturo" el "Fidelio" (Beethoven)
La reprezentanto de S-ro G.DEFFERRE, urbestro de Marseille, bonvenigas la kongresanojn en la urbon.
La reprezentanto de la Prefekto, je la nomo de la francaj aŭtoritatoj, salutis kaj bonvenigis la Esperantistojn.
S-ro G.CANUTO, Prezidanto de U.E.A., bonvenigis en la nomo de U.E.A.
Li dankis la Prefekton, la Urbestron, kaj S-ron COTY, kiu bonvolis esti Honora Protektanto. Li memorigis pri la laboro farita por la lingvo Internacia de la francaj pioniroj, Generaloj BASTIEN, SEBERT.
S-ro H.BOURDELON, Prezidanto de L.K.K., salutis kaj bondeziris por la kongreso kaj restado en Provenco.
Registaraj reprezentantoj salutis la kongreson:
Aŭstrujo: S-ro Philippovich, kultura ataŝeo kaj konstanta delegito UNESKO
Belgujo: S-ro Remi Van Eynde, Ŝtata Konsilanto.
Brazilo: S-ro Carlos A. de Carvalho e Sousa, Brazila Konsulo en Marseille
Danlando: S-ro S.ven Dragsted, de la Financa Ministerio de Danlando.
Germanujo: S-ro W.Herrmann.
Jugoslavio: S-ro Luka Belamaric, Ĝenerala Konsulo.
Nedrlando: S-ro Inĝeniero Isbrucker.
Norvegujo: S-ro Carl Støp Bowitz.
Respubliko Dominikana: S-ro Gatau.
Svedujo: S-ro Einar Dahl, Parlamentano.
Uragvajo: La Ĝenerala Konsulo en Marseille.
U.N.E.S.C.O. estis reprezentita de Fraŭlino BOHN, de la departemento de informado. Ŝi legis leteron de la Ĝenerala Direktoro, salutantan la Kongre.
Landaj Asocioj salutis la Kongreson:
Aŭstralia Esperanto Asocio - S-ro Jack Hawks
Aŭstria Esperantista Federacio - S-ro Werner
Belga kaj Flandra Ligo - S-ro Van Eynde
Brita Esperantista Asocio - F-ino E.M.Wheatley
Bulgara Esperantista Asocio - S-ro Georgi Dolapĉiev
Centra Dana Esperantista Ligo - S-ro S.Dragsted
Esperanto Asocio de Finnlando - S-ro Hannes Koivu
Unuiĝo Esperantista Franca - S-ro Llech-Walter
Germana Esperanto Asocio - D-ro W.Herrmann
Hispana Esperanto Federacio - S-ro Fernando Bayo
Itala Esperantista Federacio - D-ro Inĝ. G.Azzi
Jugoslavia Esperanto Federacio - S-ro I.Rotkviĉ
Maroka Esperanto Asocio - S-ro Ch.Thollet
Nederlanda Societo Esperantista - S-ro Zondervan
Norvega ESPERANTISTA Ligo - S-ino M.W.Jørgensen
Novzelanda Esperanto Asocio - S-ro King

Asocio de Esperantistoj en Pollando - S-ro Andreo Rajski
Sveda Esperanto Federacio - S-ino I.M. Lindkvist
Svisa Esperanto Societo - S-ro B.Graf
Esperanto Ligo por Nordameriko - S-ino B.Helmuth
Nealiĝintaj Asocioj:Tutŝtata konsulta komitato esperantista en Ĉekoslovakio
S-ro Vuk Echtner
Sarlanda Esperanto Asocio - S-ino Grete Kraft
Hellena Esperanto Asocio - S-ro J.Kaloumenos kaj SudAfriko
Salutis la kongreson reprezentanto de Internacia Societo pri Kriminologio
Muziko: El la Opero "La Arlesanino" de Bizet: a) Intermezzo, b) Farandolo.
Festparoladon faris S-ro LAPENNA, Generala Sekretario de U.E.A.
La inaŭguron finis komuna kantado de la himno " La Espero".
12,00 h. Komuna fotografado,sur la monumenta ŝtuparo de la stacidomo.
16,00 h. Fermita kunsido de Akademio de Esperanto.
Estrarkunsido de Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj.
17,00 h. Katolika Diservo (Preĝejo Notre Dame de la Garde)
Protestanta Diservo (Temple, Rue Grignan)
Framasona kunveno (24 Rue A.Bédarride)
19,30 h. Kunveno de la Rektoro kaj Prelegantoj de Internacia Somera Univ.
20,00 h. Inaŭguro de Internacia Somera Universitato. Rektoro, Prof. WARINGHIEN, bonvenigis la profesorojn kaj la ĉeestantaron.
D-ro Ivo LAPENNA prelegis pri "Suvereneco kaj federacia principo".

Lundon, 5-an de Aŭgusto.
9,00 h. Internacia Somera Universitato.Prelego de Prof. Hugo SIRK, pri "la uzo de radiokarbono por la determino de la aĝo de la organikaĵoj".
10,00 h. Unua ĝenerala kunveno de U.E.A. Prezidis; Prof. G.CANUTO.
Salutis la kunveno reprezentantoj de la jenaj organizaĵoj:
Akademoo de Esperanto: S-ro Inĝ.ISBRUCKER
Eŭropa Asocio de Popoluniversitatoj: S-ro P.PETIT
INTERNACIA FEDERACIO DE ESPERANTISTAJ FERVOJISTOJ, kaj INTERNACIA FEDERACIO DE ARTAJ KAJ INTELEKTAJ ASOCIOJ FERVOJISTAJ: Fraŭlino G.LEMONNIER
Klubo de Esperantistaj Veteranoj: S-ro LEWIN
Internacia Scienca Asocio Esperantista: S-ro C.STØP-BOWITZ
Tutmonda Esperantista Kuracista Asocio: Prof. G.CANUTO
Universala Ligo: F-ino M.VERMAAS.
14,00 h. Unua Sekcio: Esperanto en la Edukado. Prezidis S-ro KENNEDY.
Tria Sekcio: Esperanto en Komerko kaj Turismo. Prezidis: S-ro P.PETIT.
16,00 h. Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj. Prezidis: F-ino DEDIEU. Partoprenantoj el 15 landoj.
Tutmonda Kuracista Esperantista Asocio. Prezidis: Prof. G.CANUTO
17,00 h. Internacia Federacio Esperantista Fervojista. Prezidis: F-ino G.LEMONNIER (Vidu aparta raporto)
18,00 h. Enlanda prelego: "Roumanille, Mistral, Aubanel, tri fondintoj de l'Félibrige". Prelegis Prof. H.BOURDELON, Prezidanto de la L.K.
21,00 h. Kongresa balo: La Kongresa Balo okazis sur la marbordo, ĉe "Hotelo de la Plaĝo". Brila Sukceso.

Mardon, 6-an de Aŭgusto.
9,00 h. Internacia Somera Universitato:Prof. Ivo ROTKVIC' : "Esperanto kaj Literaturo".

10,00 h. Dua Sekcio:La Internacia Lingvo en Scienco kaj tekniko.Prezidis: Prof. Ivo LAPENNA. 250 partoprenantoj el 24 landoj.
14,00 h. Internacia Scienca Asocio Esperantista:Jarkunveno. Prezidis: S-ro STØP-BOWITZ. 30 partoprenantoj el 12 landoj
Europa Lingva Kampanjo.Prezidis:D-ro HERRMANN (40 partoprenantoj el 12 landoj).
16,00 h. Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj. Prezidis: F-ino J.DEDIEU. 70 partoprenantoj el 9 landoj.
17,00 h. Kristana - Esperantista Ligo Internacia. Prezidis: D-ro DE BOER
Veterana Esperantista Klubo. Prezidis: R.SAKOWICZ
20,00 h. Internacia Somera Universitato: Prelegis Mag. W.AULD pri "Anglalingva Poezio de la 20-a Jarcento".

Merkredon, 7-an de Aŭgusto.
9,00 h. Internacia Somera Universitato: Lekt. Marjorie BOULTON, M.A.,B. Litt. Oxon. "Enkonduko en la Internacian Semantikon".
10,00 h. Internacia Somera Universitato: Lekt C.STØP-BOWITZ, kuratoro ĉe la Zoologia Muzeo en OSLO: "La Parenceco inter vertebruloj".
11,00 h. Fondkunveno de Jurusta Asocio: Fondiĝis la "Internacia Asocio de Juristoj Esperantistoj". Prezidis: Prof. I.LAPENNA.
14,00 h. Belarta Konkurso. La Juĝa Komisiono, konsistanta, el S-roj R. BERNARD, L.HERNANDEZ, F.SZILAGYI (por la prozaj branĉoj), E.A. HAUGEN, ST. LA COLLA, kaj G.WARINGHIEN (poeziaj branĉoj), prijuĝis sume 61 konkursaĵojn el 16 landoj.
16,00 h. Enlanda Prelego: F-ino Colette LLECH-WALTER prelegis pri "La ekzistencialismaj herooj en la verkaro de Jean-Poul Sartre".
Internacia Scienca Asocio Esperantista.Prezidis: C.STØP-BOWITZ
Internacio de Militrezistantoj.Prezidis: F-ino NOLL.60 partopre.
Esperanta Ŝakligo Internacia.Prezidis: J.DUTHILLEUL
17,00 h. Internacia Geografia Asocio. Kunveno.
18,00 h. Akcepto de la Kongresanaro en Parko BORELY. Kastelo kaj Parko BORELY estas historia bieno, al la Urbo donacitaj de la posedanto, kies nomon ili koservis. En tiu agrabla loko, de la Marsejlanoj tre konata kaj ŝatata, la Urbo kaj la Komerca Ĉambro de Marseille akceptis oficiale la Krongresanaron.Trinkaĵoj estis servitaj, dum la urba muzikistaro koncertis.
20,00 h. Rapidluda turniro por ŝakludantoj sub la aŭspicoj de la Franca Federacio de Ŝakludantoj.

Ĵaŭdon, 8-an de Aŭgusto.
Ekskursoj: Tuttagaj ekskursoj al "Folklora Provenco", "Blua Mediteraneo" (Cavalaire) kaj "Montaj interkrutaĵoj" (Gorges du Verdon).
La unua ĉisupra ekskurso estis la ĉefa pri la nombro. En Urbodomo de Arles okazis akcepto oficiala kaj paroladoj estis aŭdataj en provencala kaj en Esperanto. Vespere, la Partoprenantoj ĝuis belan spektaklon de ludoj kaj dancoj folkloraj en la Antikva Teatro.
Posttagmeza vizito de la fabrikejo "Nestle" en Marseille.

Vendredon, 9-an de Aŭgusto.
9,00 h. Internacia Somera Universitato.Prof. G.CANUTO. "Tio, kio postrestas el la teorioj de Cesaro Lombroso".
10,00 h. Dua Generale Kunveno de U.E.A. Prezidis: D-ro W.HERMANN.
15,00 h. Akademio de Esperanto: Prezidis: Inĝ.ISBRUCKER. Publika kunveno.
16,00 h. Tria kunsido de la Komitato de U.E.A.

16,30 h. Fondo de Verkista Asocio. Prezidis: S-ro W. AULD
Fondo de Internacia Polica Ligo.
Ĵaŭde, la delegacio de la polico el Bologna, Italujo, konsistanta el 5 policistoj, estis akceptita de la Supera estro de la Marseille-a Polico en la Policodomo. Kun la partopreno de la policestroj de la diversaj fakoj, okazis vizito de la instalaĵoj, dum kiu estis klarigata, kun traduko en Esperanto, la funkciado de la Marseille-a polico, ĉefe en la trafika laboro. La Bologna-aj policanoj ricevis apartajn informojn pri la statistika kaj esplora centro de la loka polico. La Marseille-a Komisaro, S-ro Zanetti, tre speciale interesiĝis pri la strukturo de la itala polico.

17,00 h. Tutmonda Esperantista Ĵurnalista Asocio. Kunveno

17,30 h. Prezentado de filmoj en Esperanto. Jen la programo: "Bonvenon al Oslo", "Prezentado de NovZelando", "Bildoj pri Jugoslavio", "Ni obeigu la akvoj" "Nesebar" (bulgara urbo), "Mainz".

20,00 h. Teatra Vespero. En la Operejo de Marseille.
Kurtenleviĝo: "Pri la malutilo de l' tabako", monola sceno unuakta de A. Ĉeĥov, aktoris Stefan FLEGO.
"George Dandin" de Molière, aktoris la Esperantista Teatra trupo de Barcelono, estro: Francesc VILA. Gravega sukceso.

Dum la posttagmezo, kun bela varma vetero, okazis la vizito de la Haveno de Marseille.
La invitoj de la Urboj VARSOVIO kaj BARCELONO por respektive la Universalaj Kongresoj de 1959 kaj 1960 estas provizore akceptitaj, sed nur principe.

Sabaton, 10-an de Aŭgusto.

9,00 h. Solena Fermo. Prezidis: S-ro H.W. HOLMES O.B.E.
LAPENNA raportis pri la decidoj de la Komitato de U.E.A.
Waringhien legis la rezultojn de la Belarta Konkurso, kaj disdonis la diplomojn.
HERRMANN invitis oficiale al la 43-a Universala Kongreso en MAINZ (Germanujo)1958
CANUTO faris la ferman paroladon, kaj dankis la organizantojn, nome, la Konstantan Kongresan Sekretarion, kaj la Lokajn Komitatanojn.
FIGHIERA, K.K.S., je la nomo de L.K.K. kaj K.K.S., specialan binditan eldonon unuekzempleran de la Kongresa Libro, kun la subskriboj, al S-ro H. BOURDELON.
BOURDELON, Prezidanto de la Loka Kongresa Komitato, dankis.
FIGHIERA dankis la lokajn komitatanojn:

H.BOURDELON, Prezidanto de L.K.K.
J.P.BEAU, Vic-Prezidanto, kaj Gazetara Servo, Branĉo Internacia.
F.CADENEL, Sekretario, kaj helpanto en la Ekskursoj.
S-ino C.BOURDELON, Kasistino.
P.SARETTO, Gazetara Servo, Franclingva Branĉo.
M.COUSINEAU, Gazetara Servo, Esperantista Branĉo.
S-ino M.CADENEL, Ekskursoj (foriris de la Kongresejo pli ol 40 aŭtobusoj)
F-ino C.CHINI, Loĝigado.
F. GARRIGUE, Deĵoroj,

kaj personojn eksterajn al L.K.K.: Niccolini, revizoro de la Kongreso
LAMBERT, gvidanto de la 2-a Infankongreseto.
S-ro BOURDELON, Prezidanto de la L.K.K. de la 42-a, transdonis la flagegon al S-ro HERRMANN, S-ro HERRMANN transdonos ĝin al L.K.K. de la 43-a en MAINZ. Tiu flago havas historion: post BERN (1939), ĝi estis transdonata al Marseille (1940), sed pro la milito la kongreso ne okazis, kaj la flago restis en ARLES dum la tuta milito. Estis kortuŝa momento kiam S-ro Bourdelon transdonis ĝin al S-ro Herrmann.
Ludoviko ZAMENHOF dankis, per simplaj sed trafaj vortoj, pro la profunda simpatia atmosfero kiun li sentis ĉirkaŭ si dum tiuj kelkaj tagoj. Ĝis revido en MAINZ!

INTERNACIA FEDERACIO DE ESPERANTISTAJ FERVOJISTOJ

La 5-an de Aŭgusto la fervojistoj el 9 landoj (Bulgarujo, Britujo, Danujo, Francujo, Germanujo, Italujo, Jugoslavio, Svedujo, Sarlando) kunvenis.

La celo de tiu kunveno estis, esplori la uzon de Esperanto sur la tereno de kulturaj interŝanĝoj.

Komisiita de la Federacio Internacia de Artaj kaj Intelektaj Asocioj inter la Fervojistoj (FIS.A.I.C.) F-ino LEMONNIER, Prezidantino de la Franca Sekcio de Internacia Federacio Esperantista Fervojista (I.F.E.F.), klarigis la celojn de tiu impona Federacio, kiu celas obligi kulturajn rilatojn inter la fervojistoj sur la internacia tereno. Jam notindaj realigoj efektiviĝis sur tiu kampo. La F.I.S.A.I.C. ricevis agnoskon de la Franca Ministerio por Edukado kaj ĝi sukcesis organizi inter diverslandaj sekcioj altvalorajn manifestaciojn. Plurfoje okazis, ke la mondlingvo estas uzata.

Pro tiu fakto la delegitoj proponis intensigi la uzadon de Esperanto en tiu medio, kaj ĉiu delegito raportis pri la agado de la landaj sekcioj ĉe kulturaj manifestacioj. S-roj GHELLI (Italujo), DOLACHEV (Bulgarujo), PALMGRAN (Svedujo), JENSEN (Danujo), GIESSNER (Germanujo) sciigis diversajn aranĝojn de F.I.S.A.I.C., ĉe kiuj Esperanto jam trovis lokon. (Vidu esperanta raporto pri Internacia Ekspozicio pri Arto inter la Fervojistoj - pag.7 Informa Bulteno nº 5 + 6)

Kiel konkludo de tiu kunveno, F-ino LEMONNIER akcentis pri la intereso, kiun F.I.S.A.I.C. kaj pli speciale ĝia ĝenerala Prezidanto Prof. MOLLION montras por E Esperanto; rilate la profesian kampon, ŝi ankaŭ atentigas la delegitojn pri la intereso vekita ĉe la Unuiĝo Internacia de Fervojoj (U.I.C.) kaj pli speciale ĉe ĝia Centro de Dokumentado rilate la laborojn de I.F.E.F. por ellaboro de teknika terminaro.

En la momento, kiam organiziĝas sur Eŭropa skalo la ekspluatado de la fervojoj, la fervojistoj ĉeestantaj la 42-an Universalan Kongreson, formulas la deziron, kel la mondlingvo enigu la fervojajn administraciojn, kaj invitas siajn landajn sekciojn, tiucele agadi.

ESPERANTO SONFILMO NASKIĜAS EN MARSEILLE

Laborkomunumo, konsistanta el kelkaj germanaj fervojistoj, esperantistoj, inter ili la Prezidanto de la Germanaj Fervojistoj-Esperantistoj, Samideano GIESSNER el Braŭnschweig, decidis krei esperantlingvan sonfilmon, en larĝeco de 16 mm.

La celo de tiu filmo estos, unue havigi al la tutmonda esperantistaro fortan helpilon por starigi grupvesperojn, due, altiri simpatiantojn kaj adeptojn al la movado, ĉar tia filmo, kiu montros gravajn seriozajn, kiel ankaŭ viglajn kaj gajajn scenojn el la Esperantuja vivo, pli celtrafe efikos ol longaj prelegoj aŭ flugfolioj. Vivantaj bildoj, kune kun nia lingva teksto tutcerte konvinkos dubulojn, kaj aliflanke donos agrablan superrigardon al la mildokoj da Esperantistoj, kiuj ne havis ĝis nun la eblecon, viziti kongreson. Multaj tiamaniere estos instigataj veturi al venontaj kongresoj.

El la kongreso la filmo ĉefe enhavas la Inaŭguron, la Internacian Someran Universitaton, la Kongresan Balon, la Infankongreseton, la oficialan akcepton, la ekskursojn, kaj ili ĉiuj estas ligitaj de kelkaj ĉarmaj roloj, luditaj de laikaj geaktoroj esperantistaj.

Tute mankis ĝis nun tia filmo en la Esperanto Movado. Ĝi forigos tian gravan mankon, sed tamen tio nur sukcesos, se la tuta Esperantistaro subtenos la aferon, tiel ke la landaj kaj fakaj asocioj amplekse prunteprenos la filmon, por ke almenaŭ parto de la elspezita mono revenu, kaj tiamaniere ekestu bazo por plia kreado de novaj filmoj. Filmo estas la plej moderna varbilo por kudromaŝinoj, ŝtrumpoj, margarino, kaj same por Esperanto. Oni do uzu ĝin, kaj bone uzu ĝin!

NE FORGESU: DIMANĈON LA 22-a DE SEPTEMBRO 1957 ĈIU ESPERANTISTO EN VARESE

## RADIO ROMA - ESPERANTO FAKO

DISSENDOJ EN ESPERANTO JARO 1957-a Casella Postale 320 Roma (Italujo)

La dissendoj okazas de horo 18,55 ĝis horo 19,10 (M.E.T.) - Ondlongoj: metroj 30,90= Mc/s.9,71; metroj 41,24 = Mc/s. 7,27 kaj metroj 50,34 = Mc/s. 5,96.
Prelegantoj: marde: alterne S-ro L. MINNAJA kaj Prof. D-ro V. MUSELLA merkrede: S-ro Luigi MINNAJA kaj vendrede: Prof. D-ro Vincenzo MUSELLA

### SEPTEMBRO 1957-a

799 mardon la 3-an : E.E. Yelland: Miaj memorajoj pri Italujo
800 merkredon la 4-an : Kuriero de Esperanto
801 vendredon la 6-an : La festo de Piedigrotta en Napolo
802 mardon la 10-an : Septembro
803 merkredon la 11-an : Kuriero de Esperanto
804 vendredon la 13-an : Leterkesto kaj bibliografio
805 mardon la 17-an : Novaĵoj el Italujo
806 merkredon la 18-an : Kuriero de Esperanto
807 vendredon la 20-an : Italujo kaj frendaj verkistoj: De Musset, okaze de la 100-a datreveno de lia morto
808 mardon la 24-an : Italaj belartaj urboj: Agrigento
809 merkredon la 25-an : Kuriero de Esperanto
810 vendredon la 27-an : Aŭtuno

### OKTOBRO 1957-a

811 mardon la 1-an : Metaponto kaj ĝiaj temploj
812 merkredon la 2-an : Kuriero de Esperanto
813 vendredon la 4-an : Sankta Francisko el Assisi
814 mardon la 8-an : Bari, la urbo de la Foiro de l'proksima oriento
815 merkredon la 9-an : Kuriero de Esperanto
816 vendredon la 11-an : Leterkesto kaj bibliografio
817 mardon la 15-an : Novaĵoj el Italujo
818 merkredon la 16-an : Kuriero de Esperanto
819 vendredon la 18-an : La Olimpikoj de 1960-a kaj Esperanto
820 mardon la 22-an : Oktobro
821 merkredon la 23-an : Kuriero de Esperanto
822 vendredon la 25-an : Harald Thilander, la pioniro de la blindaj E.80-jara
823 mardon la 29-an : Ĉirkaŭo de Romo
824 merkredon la 30-an : Kuriero de Esperanto

La Fakestro: L. MINNAJA

## SVISA RADIO

Ni atentigas tiujn kiuj kutime aŭskultas la frendajn Esperant-programojn ke, jam de kelke da tempo, la vespera elsendo de la Svisa Radio (S.S.R.) ne plu okazas marde kaj ĵaŭde, sed lunde kaj vendrede.

La tempoj de la elsendoj, do, estas: Lunde, h.18,30: D-ro A.Baur - Marde, h.12,55: D-ro A.Baur - Ĵaŭde, h.12,55: Prof. E.Privat - Vendrede, h.18,30: Prof. E.Privat. La ondlongoj estas: HER 3 6165 Kc.48,66 m. HER 4 9535 Kc.31,46 m.

## RADIO SOFIA

La centra komitato de Bulgara Esperantista Asocio sciigas ke ekde la 2-a de junio ankaŭ Radio Sofia komencis regulajn dissendojn en Esperanto.

La dissendoj okazas ĉiudimanĉe dum 25 minutoj: je la 20 h.(Ondlongoj: 39,11 m. 7670 Khc. kaj 49,42 m. 6070 Khc.); je la 23,30 h.(Ondlongoj: 39,11 m. 7670 Khc. kaj 30,93 m. 9700 Khc.). La programo enhavas temojn el kultura, socia, ekonomia, politika, muzika karaktero, k.t.p. La tutmondaj Esperantistoj estas invititaj esprimi siajn impresojn de la aŭdado de Radio Sofia kaj fari rekomendojn sugestojn, k.s.